

THE NORTH AMERICAN

# Esperanto Review

Pri La "Unua Libro"

Common Prejudices  
About Esperanto



Novembro-Decembero 1962

# *The* NORTH AMERICAN ESPERANTO REVIEW

Vol. 10, No. 5

808 Stewart St., Meadville, Pa.

DONALD BROADRIBB, Editor

Published by the Esperanto League for North America, Inc., as its official organ, and founded in 1953. The Esperanto League is officially affiliated with the Universala Esperanto-Asocio (in consultative relations with UNESCO), and is a participating organization in the People-to-People Program (John F. Kennedy, Honorary Chairman; Dwight D. Eisenhower, Chairman, Board of Trustees).

**Subscription Rates:** \$3.00 regular, \$2.75 gift subscription (three for \$5.00). **Membership Rates:** \$5.00, regular; \$10.00, supporting member; \$20.00, patron member; \$100, life member; \$7.00, man and wife. Checks and money orders should be payable to the Esperanto League for North America. **Send all payments and correspondence to the Esperanto League for North America, 808 Stewart St., Meadville, Pennsylvania.**

**Officers of the Esperanto League for North America, Inc.:** President, David B. Richardson, R.F.D. Box 81, Eastsound, Washington; Vice-President, Charles E. Peterson, 8314 E. Florence, Downey, California; Secretary, Conrad Fisher, 808 Stewart St., Meadville, Pennsylvania; Treasurer, Jay Berry, 3231 N.W. 62nd St., Seattle 7, Washington. **Executive Board:** Armin F. Doneis, Sr., P.O. Box 105, Pharr, Texas; Thomas A. Goldman, 7008 Millwood Rd., Bethesda 14, Maryland; Dorothy Holland, 1701 Rockwood Trail, Fayetteville, Arkansas; Frans J. Jahger, 2736 Locust Dr., Bridgeville, Pennsylvania; James Lieberman, 24 Claffin Rd., Brookline 46, Massachusetts; Paul Nace, 1410 Ray Road, Hyattsville, Maryland; Catherine Schulze, 410 Darrell Rd., Hillsborough, California; Roan Orloff Stone, 504 N. 5th St., Gallup, New Mexico; Martha Walker, 2846 Monticello Road, Napa, California.

**Information Section** of the League: 7008 Millwood Road, Bethesda 14, Maryland. **Audio-Visual Aids Department:** 1908 E. 8th Ave., Spokane 32, Washington. **Book Service:** Esperanto League Book Service, Middleton, Wisconsin. **Administration of the Review:** Francis Helmuth, P.O. Box 6215, San Diego 6, California.

Material for the next issue of the **Review** must reach the editor by the 1st of October.

## COMMON PREJUDICES ABOUT ESPERANTO

**Have you met them? If so, were you able to meet them? What are your comments?**

1. A language is the result of hundreds of years of evolution. An artificial language cannot become a living one.
2. Perhaps Esperanto is satisfactory as a code for business, but it is not a cultured natural language and therefore it cannot express shades of meaning for thought or for poetry. Esperanto has no literary traditions, literature, or poets.
3. Esperanto is not suitable as a language for science. There is no scientific literature in Esperanto, nor scientific terminology, and no scientist uses Esperanto. Esperanto lacks the flexibility and precision of German, and the wide spread of the traditional scientific languages.
4. The real international language that everyone uses today is English. Considering the widespread use of English, its growing influence and the number of publications produced in it all over the world, it is utopian to assume that Esperanto could in any way compete with it. However, if in the future any other language should take the place of English, it would be French, German, or Russian.
5. If after seventy-five years Esperanto has not succeeded in becoming popular, it is clear that it does not have the qualities to play the part of an international language and it will never succeed.
6. The national languages express the soul of their peoples, within which they have spontaneously grown. The existence of the national languages is essential to the existence and expression of society. Esperanto intends to supplant the national languages and consequently is an objectionable phenomenon.
7. Esperanto lacks practical value: it is not used in any international non-Esperantist meeting, and it is difficult to find persons who know it.
8. If an artificial language were really useful, then we would have to choose between various artificial languages, some of which are better constructed than Esperanto. Interlingua, for example, is immediately understood by the majority of persons, while Esperanto, because of its arbitrary root selection, strange spelling and unscientific plurals in *j*, has a foreign appearance.
9. Even if Esperanto were to succeed, after several centuries it would break down into dialects because all nationalities would pronounce Esperanto differently, and little by little the Esperantists would have difficulty in understanding each other.
10. Perhaps Esperanto is relatively easy for Westeners, but Orientals certainly have great difficulty in mastering it. Therefore, Esperanto is not only not equally easy for all nationalities, but it is a new secret tool of superiority of the Western countries over the Oriental.
11. Esperanto is a front for Communism. Many Esperantists are known Communists, and, besides, Esperanto is widely used to spread propaganda of the so-called "people's democracies" and to spread international Communism.
12. Esperanto came into existence at the end of the last century among many other sentimental utopian ideas of the bourgeois mentality of that time.

(from Heroldo de Esperanto,  
March 1, 1962)

## DO YOU KNOW WHAT ESPERANTO IS?

In a recent issue of an Esperanto periodical from France (SAT-Amikaro) we read a report of a contest published in a French children's magazine, *Jeunes Années*. The contest involved the translation of some simple phrases out of and into Esperanto, and the answer to this question: "Explain in a few lines what Esperanto is, what its practical values are, its possible uses, etc." From 3,285 entries some choice answers to this last question included—

Esperanto is a simple language that even the most stupid people can learn.

Esperanto is a secret code used by the police.

You can talk in short sentences in Esperanto. People who hear you and haven't dared learn it think you're smart.

Esperanto is the dialect that Americans, Japanese, and Europeans use like we use French.

I think Esperanto is Spanish; it is an easily learned language; it is a beautiful country because of its costumes and its famous bull fights.

Esperanto is used to simplify words.

Esperanto is good for talking with somebody else, if there are other people present that musn't know what you are saying. In prisoner of war camps it is used so the guards won't understand.

Esperanto is a sort of mixture of negro and Indian.

Esperanto, that is Spain, its exports are fruit, port wine, mats, carpets, lace.

Esperanto is the ancient language of Spain; it was used by old people.

These answers were from children (as young as eight years old), but we venture to suggest that equally amusing answers might be had from any age group of our own population.

Adolf Holzhaus

## LA UNUA LIBRO PRI ESPERANTO

En aŭgusto, 1879, Lazaro Zamenhof eniris la medicinan fakultaton de la Moskva Imperiestra Universitato, kaj loĝis ĉe numero 27, de Tverskaja ulica (strato).<sup>1</sup> De aŭgusto, 1881, li daŭrigis siajn medicinajn studojn en la Varsovia Imperiestra Universitato, kies kurson li finis en la komenco de januaro, 1885, kaj ricevis kuracistan diplomon.<sup>2</sup> Ĝis la fino de januaro li finpreparis sian manuskripton de internacia lingvo. P. Stojan en sia libro *Deveno kaj Vivo de la Lingvo Esperanto* skribis: "Nun post la sciigoj, venintaj de la Zamenhofa familio, akorde kun liaj leteroj, ni scias, ke la manuskripto de la unua libro estis preta jam en 1885."<sup>3</sup> En la komenco de februaro Zamenhof forveturis la litovan urbeton Vejseje (litove, Veisiejai), en la gubernio Suvalki, kie loĝis lia fratino Fania Pikover,<sup>4</sup> kaj komencis medicinan praktikadon. En majo, 1885, li revenis Varsovion, ekloĝis ĉe la strato Novolipie, numero 28, kaj dum ses monatoj studis okulmedicinon en hebrea hospitalo ĉe angulo de la stratoj Inflancka kaj Pokorna.<sup>5</sup> En la fino de 1885 li forveturis la urbon Plock ĉe Vistulo, ekloĝis en domo ĉe la strato nun nomata Kolegialna,<sup>6</sup> provis kuracadon kiel okulkuracisto, poste en majo, 1886, li iris Vienon. Tie li loĝis en la hotelo Hammerand, ĉe numero 8, Florianigasse, studis okulmedicinon en klinikoj, kaj en la fino de la jaro revenis Varsovion. Li komencis okulistan praktikadon en la loĝejo de siaj gepatroj ĉe numero 40, Strato Muranovska.<sup>7</sup>

De la fino de januaro 1885 li dum du jaroj vane serĉis eldononton. Kiam li jam trovis tion, la eldonisto dum duonjaro pretigis la broŝuron por eldono kaj fine tamen ĝin rifuzis.<sup>8</sup> En la vintro de 1886/7 Zamenhof konatiĝis kun fraŭlino, Klara Zilbernik el Kovno (litove, Kaunas), kiu gastis ĉe sia fratino en Varsovio kaj kiu konsentis doni monon por eldono la manuskripton. En la komenco de

februaro, 1887, li transdonis sian pretan manuskripton al la presisto H. Kelter, kiu dum du monatoj preparis la presadon. En la komenco de aprilo Zamenhof sendis presprovaĵon al la rusa cenzuristo Lagadovski, kiu dum du monatoj tenis ĉe si la presprovaĵon,<sup>9</sup> kaj la 2an de junio (= la 21an de majo laŭ la malnova, juliana kalendarstilo) donis prespermeson.<sup>10</sup> Post ricevo de la prespermeso, H. Kelter finpresis la libron. La 26an de junio (= la 14an de julio laŭ la malnova kalendarstilo), 1887, la libro en la rusa lingvo eliris la presejon<sup>11</sup> kun la titolo: **Dr. Esperanto Mejdunarodnij jazik. Predisloviĵe i polnij učebnik. Por rusoj.** Sur la titolpaĝo aperis moto: ĉtobi jazik bil vsemirnim, ne dostatočno nazvatj jego takovim.

Sur la dua paĝo estis: dozulveno cenzuroju. Varšava 21 maja 1887 goda (= Permesita de la cenzuro. Varsovio, 21an de majo, 1887). Mal-supre: internacionalnij jazik, podobno vsjakomu nacionalnomu, sostavlĵajet obščestvennoje, i ot vsjakih ličnih prav na nego avtor na vseĝda otkazivajetsja (= Internacia lingvo, simile al ĉiu nacia, estas proprajo nacia, kaj la aŭtoro por ĉiam forcedas ĉiujn personajn rajtojn je ĝi). Sur la lasta paĝo ruse kaj esperante: Adreso de la aŭtoro: Al Sinjoro D-ro L. Zamenhof, por D-ro Esperanto en Varsovio. Ĉefa vendejo de tiu ĉi broŝuro (en rusa lingvo) en librovendejo de V. A. Istomin en Varsovio. Sur la antaŭlasta paĝo de la kovrilo estis teksto: pravo perevoda etoj broŝuri na vse drugije jaziki prinadleĵit vsem (= la rajto de traduko de tiu ĉi broŝuro en ĉiujn aliajn lingvojn apartenas al ĉiuj).

La broŝuro enhavis: A. Prologon (28 paĝoj), en kiu ni trovas la unuajn esperantajn tekstojn — 1 Patro Nia (preĝo); 2. El la Biblio; 3. Letero; 4. Mia Penso (poemo); 5. El Heine (traduko de 12 linioj); 6. Ho, Mia Kor' (poemo). B. Vokon al la legantoj (2 paĝoj). C. 8 kuponon-ojn, sur kiuj estis promeso elerni Esperanton, se dek milionoj da personoj donos publike la saman promeson (4 paĝoj). Ĉ. Lernolibron de

la Lingvo Internacia, konsistantan el la alfabeto, 8 gramatikaj kaj 8 ĝener-alaj reguloj (6 paĝoj). Sume, 40 paĝoj. Krom tio, sur aparta folio (41½ x 44½cm) estis vortaro Internacia-Rusa, enhavanta 917 radikojn kaj klarigojn pri ĝia uzo. La formato de la broŝuro estis 19½ x 14cm.

Sekvis diversaj eldonoj. La 6an de septembro (= 15a de aŭgusto), 1887, en la pola lingvo (cenzurdato: la 21an = 9an de julio) kun la titolo: **Dr. Esperanto. Jedzyk miedzynarodowy. Przedmowa i podrecznik kompletny. Por popoloj.** Moto: Aby jazyk stal sie powszechnym, nie wystarcza nazwac go takim.<sup>12</sup>

La 24an de novembro (= 12an), 1887, en la franca lingvo (cenzurdato: la 24an = 12an de septembro) kun la titolo: **Dr. Esperanto. Langue internationale. Préface et manuel complet. Por francoj.** Moto: Pour qu'une langue soit universelle, il ne suffit pas de lui en donner le nom.<sup>13</sup>

Samdate (cenzurdato: la 2an de novembro = la 21an de oktobro) en la germana lingvo: **Dr. Esperanto. Internationale Sprache. Vorrede und selbständiges Lehrbuch. Por germanoj.** Moto: Damit eine Sprache zur Weltsprache werde, genügt es nicht, wie so zu benennen.<sup>14</sup>

La 13an de februaro, 1888, en la angla lingvo<sup>15</sup> (cenzurdato: la 24an = 12an de januaro): **Dr. Esperanto's International Tongue. Preface and complete method. Edited for Englishmen by J. St.** Moto: For making a tongue international it is not enough to call it so. Krome: Warsaw 1888. Property of the editor.<sup>16</sup>

Henry Phillips el la franca traduko pretigis version en la angla lingvo kun la titolo: **An Attempt Towards an International Language by Dr. Esperanto, translated by Henri Phillips Jr., Together with an English-International Vocabulary Compiled by the Translator. New York. 1889.** Sen moto.<sup>17</sup> La antaŭparolo portis la daton 17 sept. 1888.<sup>18</sup>

Ankaŭ ĉar la angla eldono pretigita de J. St. havis multajn erarojn anglalingvajn, R. H. Geoghegan pretigis

novan tradukon kaj en 1889 eldonis ĝin kun la titolo: **Dr. Esperanto's International Language. Introduction and Complete Grammar.** Por angloj. English Edition by R. H. Geoghegan. Oxford 1889. Sen moto. La cenzurdato estis la 17an de januaro = 5an, 1889.<sup>19</sup>

Tiuj du lastaj libroj aperis antaŭ oktobro, 1889.<sup>20</sup> Sekve, la libro de Geoghegan estas la tria traduko en la anglan lingvon de la unua libro pri Esperanto. Post la apero de la libro de Geoghegan, Zamenhof detruis sian stokon de la angla eldono preparita de J. St., kaj en la **Nomaro de verkoj pri la lingvo internacia Esperanto** kiuj eliris ĝis oktobro 1889 ĉe numero 5 li indikis ne la anglan eldonon de J. St. sed la anglan eldonon de R. Geoghegan.<sup>21</sup>

De la unua libro ankoraŭ aperis tradukoj: en 1888 en la hebrean lingvon (titolo: Hanez. Safah achath lekulanu); en 1889 en la jidan lingvon (titolo: Hanez: Lernolibro de la lingvo Esperanto); en la svedan lingvon (titolo: G. Henriellundquist. Dr. Esperanto. Internationelt Sprak. Foretal och Fullständig Larebok. Warschau. 1889); en la latinan lingvon (titolo: R. Libeks. Starptautiska waloda, "La Lingvo Internacia" no Dr. Esperanto. Riga 1889. Sen moto. Cenzurdato la 1an de aprilo = 20an de marto, 1889). Tiuj libroj aperis antaŭ oktobro, 1889.<sup>22</sup>

La unua libro en la rusa lingvo aperis en du eldonoj. Ambaŭ broŝuroj estas tre similaj kaj datitaj 1887, sed malgraŭ tio la dua aperis unu aŭ du jarojn poste. La sama dato presigis por eviti novan devon cenzurigi la libron. Zamenhof zorge kaj atente korektis la presprovajojn de la unua libro, kaj tial ĝi estas tute senerara. Poste, pro tro granda laboro kaj korespondado, li devis fidi al la presisto H. Kelter pri la kopiado de la unua libro, kaj sekve en la duan eldonon iris preseraroj. Sur p. 21, konitojn anstataŭ konatojn; p. 23, vinkos anstataŭ venkos; p. 38, ĉiuj anstataŭ ĉiuj. Sur p. 27 de la dua aldono estis 10 linioj pli, kiuj tradukite tekstas: Ĉar tiukaze la rifuzo estus jam ne profitemo, sed krimo, ne

malzorgema rilato al la komuna afero, sed pripensita kontraŭbatalo de ĝi; rifuzo en similaj okazoj, povis esti klarigata nur per timemo de iu aristokrato de sango, scienco aŭ mono, ke lia nomo ne troviĝu sub la nomo de persono staranta pli malsupre ol li. Sed mi permesas al mi esperi, ke oni trovos malmultajn homojn, kiuj pro tia malplena vanto decidus malrapidigi la komunan homaran aferon. Sen iu senkulpiĝo antaŭ la socio restos en la estonteco tiuj personoj, kies nomoj troviĝos nek en la fako de la promesintoj nek en la fako de la rifuzintoj. Neniu esperu senkulpiĝi per tio, ke li "ne aŭdis" pri la proponita voĉdono, ĉar oni prenos ĉiujn mezurojn, por ke ĉiuj sciu pri la voĉdono."

Pro la aldono, p. 30 havas 28 liniojn anstataŭ la 11 linioj de la unua eldono.<sup>23</sup>

En 1948 en Helsinko, Finnlando, faksimile represita eldono aperis en 500 ekzempleroj, laŭ la dua eldono de la rusa broŝuro.

#### Notoj:

1. **Esperanto**, 125, 20 junio 1912, p. 168; **La Nova Epoko**, 75, dec. 1929, p. 63.
2. G. Waringhien: **Leteroj de L. L. Zamenhof**, 1948, vol. 1, p. 112.
3. P. Stojan: **Deveno kaj Vivo de la Lingvo Esperanto**, 1953, p. 45.
4. **Memorlibro pri la Zamenhof-Jaro**, 1960, p. 13.
5. A. Mobusz: **Dokumentoj de Esperanto**, 1921, p. 16, 17; M. Ziolkowska. **Doktor Esperanto**, 1959, p. 127.
6. Letero de la 4a de dec. 1959 de la Asocio de Polaj Instruistoj en Ploc al A. Holzhaus.
7. **Esperanto**, 125, p. 168; Waringhien: **Leteroj**, vol. 1, p. 112; L. Kokeny kaj V. Bleier: **Enciklopedio de Esperanto**, 1934-5, vol. 2, p. 518.
8. A. Mobusz: **Dokumentoj**, p. 28.
9. E. Privat: **Vivo de Zamenhof**, 1920, p. 78-9 (1946: p. 50). J. Dietterle: **Originala Verkaro de L. L. Zamenhof**, 1929, p. 489.

10. Dr. Esperanto: **Mejdnarodnij jazik**, 1887, p. 2.
11. A. Zakrzewski: **Historio de Esperanto** (1887-1912), 1913, p. 8; Kokeny kaj Bleier: **Enciklopedio**, vol. 2, p. 550.
12. Zakrzewski, p. 9, 10, 14.
13. Zakrzewski, p. 10, 14; **North American Esperanto Review**, Marto-aprilo, 1960, p. 16.
14. Zakrzewski, p. 10, 14; Dietterle, p. 475; poŝtkarto de la 1a de decembro, 1960, de Ch. Chomette en Los Angeles al A. Holzhaus.
15. Dietterle, p. 488.
16. Zakrzewski, p. 14; **N. A. E. R.**, Marto-aprilo, 1960, p. 16; letero de la 20a de decembro, 1960, de M. C. Butler al A. Holzhaus.
17. Zakrzewski, p. 20.
18. **N. A. E. R.**, Jan-Feb., 1957, p. 5.
19. Zakrzewski, p. 14; **Katalogo de la Biblioteko de Georg Davidov en Saratov, Rusujo**, 1911, p. 2; **N. A. E. R.**, Jan-Feb., 1957, p. 5; letero de Butler.
20. Dietterle, p. 597-8.
21. Dietterle, p. 597.
22. **Katalogo**, p. 8, 12, 15; Dietterle, p. 598-9; letero de Butler.
23. **Esperanto**, 587, Okt. 1954, p. 278; **N. A. E. R.**, Jan-Feb., 1957, p. 5; letero de Chomette, la 3an de junio, 1960, al A. Holzhaus.

## AL ALILANDAJ ESPERANTO-GAZETOJ

Estas ebleco peti turismajn presadojn usonajn en Esperanto. Ben Butterfield, Director of Sales Promotion, U.S. Travel Service, U.S. Department of Commerce, Washington 25, D.C., estas la persono alskribenda. Oni ne nun uzas Esperanton, sed Ben Butterfield havas intereson pri ĝi. Conrad Fisher, sekretario de ELNA, tradukos por li anglalingvajn presadojn, por ebligi la enmeton de esperantaj tradukoj en la faldfoliojn sendotajn al petintoj. Helpu nia usonan movadon per peto de tiaj faldfolioj.

## NIA REVUO

nun havas novajn vestojn, kaj ĝia redaktoro estas tre dezirema, kiel eble plej taŭgigi ĝian enhavon por la movado en nia lando. Ĉiu leganto havas opiniojn pri la **Revuo**, kaj ni tre deziras aŭdi tiujn opiniojn. Ĉu vi bonvolos uzi kelkajn minutojn por, sur la subdonita kupono, noti viajn opiniojn por ni? (Aŭ uzu apartan folion, se vi preferas.) Sendu aŭ rekte al la redaktoro, aŭ al la adreso de ELNA en Meadville:

1. Ĉu via opinie la Revuo devus aperi tute en Esperanto (kiel rekomendas punkto 12k de la UEA Laborplano)?

Aŭ ĉu vi opinias, ke duono de la Revuo devus esti en la angla lingvo?

Aŭ alia kvanto? (Kiom?)

2. Ĉu via opinie la Revuo devus regule aperi materialon por novaj studentoj de Esperanto?

3. Ĉu via opinie la Revuo devus aperi literaturajojn verkitajn de usonanoj?

Verkitajn de alilanduloj?

4. Ĉu vi ŝatas la aspekton de la kovriloj?

5. Ĉu vi opinias, ke librocenzoj devus regule aperi?

Aŭ ĉu ni recenzu nur elstare gravajn librojn?

6. Ĉu la bildoj estas sufiĉe multaj?

7. Ĉu vi opinias, ke la Revuo sufiĉe raportas pri la internacia Esperantomovado?

8. Ĉu vi opinias, ke la Revuo sufiĉe raportas pri la enlanda movado (klubraportoj ke.)?

9. Kosciante, ke ni laŭeble plej bele presigas la Revuon per nia malforta financa havaĵo, kiel vi sugestas, ke ni plibeligu la gazeton?


10. Kiajn artikolojn vi volas pli ofte vidi en la Revuo?

11. Kiujn komentojn aliajn vi havas?

## CHU VIA KOTIZO DENOVE ESTAS PAGENDA



# ESPERANTO NEWS NOTES



In Japan, a contest for naming a new tape recorder model has resulted in the adoption of an Esperanto name, *Belsona*. The Esperantist who suggested the name received a free tape recorder in payment.

**Edmond Privat**, well known in Quaker and World Federalist circles, professor of English literature at the University of Neuchatel, active in the League of Nations, and a speaker for Radio Geneva, died at the age of 73 on August 28. Among Esperantists he was noted as a talented orator, co-founder of the Universal Esperanto Association, and author of numerous books including *Vivo de Zamenhof*, *Historio de Esperanto*, *Federala Sperto*, and the recent *Jun-aga Verkaro*.

An International Catholic Radio-amateurs Club, using Esperanto, has been founded by Father **Manuelo Sciaivoni**, SDB (Colegio Pio IX, Don Bosco 4002, Buenos Aires, Argentina). The group transmits each Saturday morning at 10 a.m. on 20

meters and 14 megacycles, and at 11 a.m. on 40 meters and 7 megacycles, using the call LU5AG, to carry a beginner's course.

In Greece, the Ministry of National Education sent a circular concerning Esperanto to all the various educational authorities in the country. Dated June 26, 1962, the circular called attention to previous recommendations in 1932, 1939, and 1946 that Esperanto be taught as an elective subject to students in the school system. It further recommended that special mention of Esperanto and its values be made in the schools, to encourage participation in Esperanto classes.

A fourth literary magazine began publication in Esperanto this fall. The magazine, titled *Monda Kulturo*, is edited by **William Auld**, a well known Scotch Esperantist and author. *Monda Kulturo* is to be published quarterly, and joins the three other established literary periodicals, *Norda Prismo*, *Nica Literatura Revuo*, and *Suda Stelo-Prometeo*.



Donald Broadribb

## FOR THE STUDENT

(1) English speaking Esperanto students often experience difficulties in trying to express such common English phrases as "book case, Esperanto teacher, tree house," etc. The difficulty lies in the fact that in English it is common for two nouns to be placed beside each other, in which event one of the nouns acts as an adjective. A simple rule for Esperanto usage can be established to help in this difficulty: **in Esperanto two words ending with o cannot be placed side by side without intervening punctuation.** To translate the English expressions, two alternatives are possible. They may be translated as compounds (libroŝranko, esperantoinstruisto, arbodomo) and the result will be grammatically correct but they will stand out as Anglicisms. A better translation would be ŝranko por libroj, instruisto de Esperanto, domo en arbo." Note that the rule will also give the student an easy to remember method of remembering that he cannot say "tio libro" and "kio domo?" when the distinction between "tiu" and "tio" is not clear in his mind.

(2) The differences between the verb systems in English and Esperanto often cause the student difficulty. A simple rule works both for Esperanto and the Romance languages in general: **if two verbs come together, the second must be an infinitive.** Thus, "mi povas vidi, vi devas skribi, mi scias legi, mi aŭdas lin paroli," where English uses either a simple verb form or a participial form.

(3) In ancient languages the word "that" commonly served as a spoken quotation mark. The King James and Douay Bibles use the English word "that" in this manner also. In Esperanto "ke" may be regarded regularly as being a quotation mark in speech. The form of the verb which follows "ke," then, is the form which would be used if there were direct quotation: Mi volas, ke vi venu =

Mi volas, "Vi venu!" Ĉu vi sciis, ke li estas ĉi tie? = Ĉu vi sciis, "li estas ĉi tie"? This also helps to explain the comma before "ke".

(4) Much bad Esperanto results from the failure of students to realize that no two languages express exactly the same concepts with the same words. If translation is done, concepts, not words, must be translated. Specifically, one Esperanto root may cover several English concepts, or vice versa. Thus, salti covers the wide concept of to jump, and to hop; atendi covers both to wait and to expect; iu covers both any and some; venis covers have come, came, and had come. On the other hand, to know covers both koni and scii; for covers por, pro, pri, al, po, per; published covers eldonis, eldonita, and eldonata; write covers verki and skribi.

(5) The best translation for "po" is @. Therefore, "he bought three books for five dollars" = "li aĉetis tri librojn per kvin dolaroj." "Tickets are seventy-five cents each" = "biletoj kostas po sepdek-kvin cendoj." "He ate five apples a day for a year" = "li manĝis kvin pomojn ĉiutage dum jaro." "Thirty students @ ten dollars each means three hundred dollars in fees" = "tridek studentoj po dek dolaroj donos kotizojn de tricent dolaroj."

(6) Most Esperanto speakers suffer from overly limited vocabularies. This is the cause of much poor writing and hesitant speaking. As in English, the student should try to learn new words regularly. Here are some relatively unknown but extremely useful words that are in the official vocabulary of Esperanto: **instanco**, an official authoritative institution; **moro**, background (as in "he comes from a background of dishonesty."); **abituriento**, high school graduate; **kontinua**, continuous; **hardi**, to harden; **distri**, to entertain; **liceo**, high school (synonymous with **gimnazio**); **tabureto**, a stool.

(7) False cognates (words which look like English words but have a

different meaning) are often a cause of misuse. **Kongreso** is a convention, not a congress; **kriminala** is relating to criminal law, not to crime; **funto** is a pound of weight, but not of money (=pundo); **proceso** is a law trial, not a manner of doing something (=procedo).

(8) Students often confuse idioms and metaphors. A metaphor is the use of a word or words in an extended meaning, in order to stress a resemblance. An idiom is the use of words together to mean something they would not mean if they were taken one at a time. Thus, "I took him for a friend of mine" is an idiom, and should be translated "mi supozis, ke li estas amiko mia." "The book talks about many things" employs a metaphor, and may be translated "la libro parolas pri multaj aferoj." "The pencil lies on the table" uses neither an idiom nor a metaphor, since one of the definitions of "to lie" is "to be in a horizontal position," thus "la kraĵono kuŝas sur la tablo." The title of an English book translated into Esperanto read "Tri Homoj en Boato—por ne Menciĝi la Hundon." This contained an English idiom, and should have been translated "Tri Homoj en Boato—kaj ankaŭ Hundon." "The leaves whispered softly to me" contains a metaphor, and may be translated "la folioj susuris milde al mi." "La libro trovis sin sur la tablo" contains a metaphor, for it is ascribing a human action to an inanimate object. "La libro troviĝis sur la tablo" does not contain a metaphor, for no action is ascribed to the object. In Esperanto the wise use of metaphors enriches one's style; the use of English idioms makes one's style incomprehensible.

## KION DONI KIEL KRISTNASK - DONACON?

En via klubo, inter viaj amikoj aŭ korespondantoj, troviĝas esperantisto al kiu vi volas doni malgrandan donacon. Kian? Donaco de abono al la Revuo kostas nur \$3.00, kaj estas samtempe distra kaj utila.

## TRI PROPAGANDILOJ EL KANADO

"One Language for the World: How it was used by people from 35 countries at the 46th Universal Esperanto Congress held in August, 1961, at Harrogate, England" (prezo: \$4 por 100 ekzempleroj) ampleksas 12 paĝojn en la formato de nia gazeto. Ĝi estas ilustrita "raporto" de Dorothy M. Henderson pri ŝia vizito al la harogata kongreso—sed ne seka raporto sed tre interesa, kaj tre personala, rakonto. Per ŝia personeca karaktero kaj ŝia facila stilo ĝi allogas.

"Esperanto, Comments and Commentary" (prezo: \$4 por 500 ekzempleroj) estas kvarpaĝa folio en la formo de 10 demandoj kaj 10 respondoj. Dorothy Henderson ankaŭ ĉi tiun verkis. Ĝi utilas speciale, se oni aldonas ĝin al alia(j) propagandilo(j), kaj antaŭsupozas, ke la varbato jam scias, kio estas Esperanto.


"75 Years of the International Language" estas 44 paĝa speciala eldono de la Kanada Esperanto-Revuo por jan-feb., 1962, kaj kostas 35 cendojn. Malsimile al la speciala broŝuro de ELNA ("Esperanto, Your Passport to World Friendship"), ĉi tiu estas esence verba kaj ne informo. Aro da artikoloj celas allogi personojn, kiujn oni poste informos pri la detaloj pri la lingvo, movado, historio, kc. Oni ricevas rabaton, mendante grandajn kvantojn da ekzempleroj: 10 por \$2.75, 100 por \$20.

Ni rekomendas, ke oni uzu ĉi tiujn klare preparitajn verketojn en la varbado, kaj nepre havu, por la intereso, ekzemplerojn de "Esperanto, Your Passport to World Friendship" kiel esencan "manlibron" pri Esperanto. Oni menuu la kanadaĵojn de KEA Book Service, 34 Martin Road, Toronto 7, Ontario; kaj la usonan "Esperanto, Your Passport . . ." de Adrian Hughes, 746 So. Bailey, Hillsboro, Oregon (prezo: 25 cendoj, aŭ 5 por unu dolaro).

# KELKAJ BILDOJ EL LA VOJAĜO DE JOŜIKO KAJINO



Ĉe la parlamentejo, kun parlamentano  
Pucinski.



Ĉerizflora Danco (en Washington,  
D.C.).



Kun William Solzbacher, ĉe la Voĉo  
de Ameriko.

Armin Doneis

## POR DEMOKRATECO KAJ STABILECO

Nia Ligo staras sur solida bazo de demokratecaj principoj. En nia strebado por daŭre plifirmigi la pozicion de ELNA kiel efika organizajo, ni ĉiam klopodas eviti la erarojn kaj mankojn kiujn oni okulfrape vidas en alia organizajo. La demokrateca regado de ELNA fare de la membraro estas unu grava punkto pri kiu ni daŭre okupas nin. Sed kune kun aŭ paralele al tiu demokrateco ni devas daŭre zorgi ke nia laboro en la Ligo estu efike plenumata de taŭgaj funkciularo kaj estraro. Nia tasko ĉiujare starigi liston de taŭgaj kandidatoj por elekto al estraraj postenoj aŭ nomigo al gravaj komitatataj laboroj ne estas facile farata ĉar ofte la Kandidatiga Komitato ne sufiĉe konas iujn el la kompetentaj, viglaj, diligentaj kaj sagacaj laborantoj en la diversaj regionoj de Usono, kaj tro malofte ricevas informojn de lokaj gvidantoj (eble pro timo perdi la "kandidatig-Untojn" el la loka laboro). Ĉe ni neniam superabundas kompetentaj kandidatoj!

Aliflanke ofte lokaj gesamideanoj malakceptas kandidatigon kiam oni tion proponas al ili aŭ pro troa okupateco en la loka aŭ regiona tereno de nia movado, aŭ pro troa modesteco. Pri troa modesteco ni diru emfaze ke la kompetenteco elkreskas kaj disvolviĝas el praktika ekzerco de niaj limigitaj fortoj kaj scioj; estas mirinde kiom ofte disvolviĝas spertaj estroj el nespertaj personoj kiuj komence malfidis, sed tamen kuraĝis akcepti kaj plenumi estrarajn taskojn. Pri troa okupateco en la loka situacio, ni memoru ke okaze oni trovas retireman personon kiu neville partoprenas la lokajn aferojn aŭ pro malsanetado aŭ pro neregulaj profesiaj laborhoroj, kiu tamen ĉiusemajne disponas pri pluraj horoj da libera tempo por hejme fari taskojn je la nacia nivelo perkoresponde por helpi la laborojn de ELNA **sen konflikto kun loka laboro!** Ofte tiaj izolemuloj estas talentaj, kapablaj kaj diligentaj. Do oni elserĉu ilin kaj

proponu al ili kandidatecon aŭ komitatatan laboron en ELNA por enjungi ilin al niaj tutnaciaj taskoj.

Ni ĉiam memoru, kiam temas pri ebla konflikto kun loka laboro, ke ELNA ne estas ia aparta organizajo, fore starante de lokaj societoj, sed ke **ELNA fakte estas kooperativa klopodo** de multaj personoj samtempe okupataj en loka laboro, kiuj konscias la neceson havi specialan organizajon por **komune plenumi** tiujn gravajn taskojn kaj servojn al nia movado kiujn ni nur povas fari kolektive, kaj kiujn societoj, kluboj aŭ izoluloj ne sukcesos iel atingi solaj. Do, devas ne esti sento pri konflikto aŭ konkuro aŭ aparteco inter la laboroj kaj laborantoj de ELNA kaj tiuj de la lokaj movadoj.

Krome, ni evitu la eraron kiun oni okulfrape vidas en iuj aliaj organizajoj, kie unu individuo tiel vigle okupas sin pri ĉiuj detaloj de la organizo ke oni lasis al li fine ĉiujn decidojn kaj farojn, kaj la ceteraj estraranoj fariĝis nuraj jesaj stampiloj aprobaĵ, kiuj sentis sin iel superfluaĵ kaj neniel asertis siajn opiniojn, konsilojn aŭ preferojn, kaj neniel akceptis respondecon. Tia situacio povas esti tre danĝera al iu ajn organizajo, ĉar ĝi ne nur invitas arogan diktatorecon en unu individuo kiu konsideras sin ĉionscia kaj nemalhavebla, sed en tia situacio oni ankaŭ neglektas la gravan disvolviĝon kaj maturigon de estontaj estroj, estraranoj kaj funkciuloj. Do, ni elserĉu taŭgajn personojn kaj instigu al ili akcepti kandidatecon aŭ nomigon al komitatoj ankaŭ en ELNA por ke ni havu rezervon de spertuloj kiuj povos ensalti en breĉon kiam iu funkciulo en ELNA emeritiĝos aŭ malsaniĝos aŭ pro iu ajn malhelpo devos ekŝigi aŭ flankenmeti sian ŝarĝon. Tio estas grava ne nur el demokrateca, sed ankaŭ el praktika vidpunktoj por garantii daŭran progreson ne zigzagantan, sed kun kontinueco.

Bonvolu diskuti tiujn ĉi punktojn en oportunaj programoj de viaj lokaj societoj kaj substreku la neceson de kunlaboremo en nia kolektiva laboro je la nacia nivelo. Per tio vi helpas la laboron de la Kandidatiga Komitato kaj garantios pli da forto en nia Ligo.

## TRADUKANTE EN ESPERANTON

Konsiderante le celon plialtigi la literaturan nivelon en Esperanto, sendube plej konsilinde estas tute ne traduki. Ĉar traduko estas preskaŭ neeviteble pli malaltnivela ol originala verko. Konsiderante la celon fari unikan esperantan kulturon, sendube estas tre dezirinde fari tradukojn. Ĉar nur per tradukoj ni povas establi veran kulturon, kiu ampleksu ja ne nur la nunan tempon aŭ la malmultajn esperantistojn, sed devas inkludi la plejbonon de ĉiuj epokoj kaj ĉiuj homoj. Tie situas la paradokso: nia literaturo, por esti literaturo, devas esti kiel eble plej originala; kaj nia kulturo, por esti kulturo, devas esti kiel eble plej tutmonda kaj tutepoka.

Tiu paradokso ne estas nur teoria amuzilo, sed praktika problemo por la literaturema. Precipe la literaturverkanto devas cerbumi senĉese, por ĝin venki. Ĉiloke ni ne povas diskuti ĉiujn flankojn de la problemo, sed nur unu gravan flankon, kiun oni ne sufiĉe diskutis, kvankam ĝi estas solvenda kiam ajn iu entreprenas fari tradukon. Tio estas: farante tradukon, kiom oni devas akomodati la karakteron de la verko al la stiloj kaj tradicioj jam establitaj en la esperanta literaturo? Speciale, se oni tradukas el neokcidenta lingvo, tiu problemo montriĝas. Kaj plejspeciale, kiam temas pri poezio.

Preskaŭ senescepte, poeziaj tradukoj akomodigaĵas al la establitaj formoj de esperanta poezio. Tio estas, unuflanke, pro la postuloj de komprenebleco (ekz., oni pretendas, ke Esperanto, okcidenta lingvo, ne kapablas tiel koncize paroli, kiel la japana; sekve, traduko devas inkludi multon ne troveblan en la originalo); pro la karaktero de la lingvo mem (ekz., fari poezian tradukon laŭ la originala greka poezio klasika ne eblas, ĉar en Esperanto mankas distingo pri longaj kaj mallongaj vokaloj, silaboj, kc.); aŭ pro estetikaj kaŭzoj (ekz., poeziaj formoj de lingvo preskaŭ unusilaba, kiel la angla aŭ la franca, malagrablas en la multsilaba Esperanto). Ali-

flanke, tio ankaŭ estas ne pro objektivaj problemoj, sed pro timo ke traduko ne sekvanta la tradiciojn esperantajn iel estos tro hereza, aŭ tro malplaĉa al la okcidenta kulturo.

Ĉi tiu fenomeno estas, kompreneble, ne trovebla unike en Esperanto. Jam de antikve estas tradicio en la okcidentaj lingvoj, ke traduko en ilin devas konformiĝi al la kutima formo de poezio en tiuj lingvoj. Sed Esperanto, obeante tiun neskribitan leĝon, perdas por si multan literaturan riĉon, neante al ĉiu neokcidenta kulturo la agnoskon ke ĝiaj literaturaj formoj estas tiel bonaj kiel la okcidentaj.

Mi donu praktikan ekzemplon, el tiu fako kiun mi plej bone konas, la antikva literaturo hebrea. Dank' al la fakto, ke ĝis antaŭ nelonge la sola literaturo en la klasika hebrea lingvo estis religia, en la Biblio, agnosko pri la karaktero de tiu literaturo malrapide evoluis. En la nuna epoko, kiam hebrea literaturo nebiblia estas konata, kaj, krome, literaturo el aliaj semidaj lingvoj antikvaj ankaŭ estas konata, literatura kritikado komencas kreski. Dum la tempo de Zamenhof eblis ankoraŭ traduki ĉion unuforme el la hebrea lingvo klasika (kvankam jam tiam multa literatura kritikado estis farita), kaj al tio ni ŝuldas la fakton, ke preskaŭ la tuta esperanta Biblio estas proza (esceptante la Psalmojn, Ijobon, kaj kelkajn aliajn malpli grandajn partojn), dum en la hebrea lingvo pli ol 60% estis poezia. Sed ni, vivantaj dum epoko kiam la semidaj literaturoj antikvaj studiĝadas, renkontas problemon: kiel ni tradukos poezian literaturon, kies karaktero estas tiel malsimila al nia, ke ĝis 1900 oni plejparte eĉ ne konsciis ke ĝi estas poezia, kaj pri kiu ankoraŭ estas multaj duboj?

En la antikva semida literaturo (t.e. la literaturoj de la Proksima Oriento, inkl. la egiptan, dum la unua kaj dua—kaj probable ankaŭ la tria—jarmiloj a.K.) poezia, konataj estis nek metro, nek rimo, nek kalkulado

de silaboj. Kaj al ni tute fremdaj, sed esencaj en la tiama literaturo, estas la divido de ĉiu linio en du (foje tri) partojn, sistema ripetado de vortoj kaj frazoj, kompleksa paralelismo inter la vortoj de la du partoj de la linio, kc. Sekve, la poezia verko ŝajnas al ni fremda—

Mi vidis la teron,  
Jen, dezerta, kaosa;  
la ĉielon,  
mankas ĝia lumo.  
Mi vidis la montojn,  
jen, ili tremas,  
ĉiujn altaĵojn,  
ili skuigas.  
Mi vidis,  
jen, mankas homo,  
ĉiu birdo de la ĉielo forflugis.  
Mi vidis,  
jen la ĝardeno: dezerto,  
ĉiuj urboj ĝiaj detruigis.  
Pro Jahŭe, pro lia furiozo.

(Jeremia 4: 23-26.)

De Aramo min kondukis Balak,  
la Reĝo de Moab, de la orientaj  
montoj:

“Iru, malbenu por mi Jakobon,  
iru, kondamnu Israelon.”

Kiel mi malbenos kiun ne malbenis  
Dio?

Kiel mi kondamnos kiun ne  
kondamnis Jahŭe?

Ĉar de la kapo de la montoj mi  
vidas lin,

de la altaĵoj mi rigardas lin:  
jen popolo aparte loĝanta,  
inter nacioj ĝi ne konsideriĝas.

Kiu sorĉus Jakobon?

Kiu dirus magion pri Israelo?

Mortu mi la morton de justuloj,  
estu mia fino kiel li.

(Numeroj 23: 7-10.)

Sed kvankam fremdaspektaj, ĉi tiuj antikvaĵoj (la unua el ĉirkaŭ 600 a.K., la dua el ĉirkaŭ 900 a.K.) havas poezian sorĉon. Ĉu ili gajnos per reverkiĝo kiu ligus ilin per metro, per rimoj, kiu kombinus la linipartojn? Aŭ ĉu Esperanto mem ne gajnos akirante inter siaj trezoroj ĉi tiun artformon?



## VIAJ ESTRARANOJ: 1

Thomas A. Goldman

Naskita la 16an de decembro, 1918, en Fort Worth, Texas, sed kreskinta en Washington, D.C., kie li lernis Esperanton dum la somero de 1933. Elstaraj datoj dum lia vivo—1936: fondis Esperanto-klubon en la Universitato Harvard; 1937: vizitis Eŭropon, renkontis esperantistojn en Kopenhago, Stockholmo, Moskvo; 1943-5, servis en la aviada fako de la usona armeo, kiel teknikisto elektrona; 1946-9, estis la usona vic-konsulo en Roterdamo, Nederlando; 1948, partiprenis sian unuan U.K., en Malmø; post reveno al Usono, en 1954 li reprezentis ELNAN en la U.K. en Harlemono. Krome menciendas, ke li estas estrarano de ELNA jam de pluraj jaroj, kaj estas fakdelegito (por statistiko) de UEA. Lia edzino, el Roterdamo, flue parolas Esperanton, kiel ankaŭ lia plejaĝa infano, Danielo. (La aliaj estas nur komencantoj, precipe la unujara.)

## CHU VIA KOTIZO DENOVE ESTAS PAGENDA

Je la jarfino la abono/membreco de multaj personoj finiĝas. Ĉu via kotizo por 1963 estas pagita?

## CHU VI VOLAS VERKI

### ARTIKOLON POR LA REVUO?

La **Revuo** ĉiam serĉas taŭgajn artikolojn por aperigo. Tio estas parte ĉar ĝi ne volas tro laciĝi siajn "regulajn kontribuantojn," kaj parte ĉar freŝaj vidpunktoj estas konstante bezonataj. Verki artikolon estas ne malfacila tasko, se oni sekvas kelkajn principojn sube troveblajn. Kaj se oni zorge sekvas la instrukciojn, la ebleco, ke la artikolo aperos, estas granda.

**Kion verki:** (1) Informa raporto pri esperanta evento en via regiono. Menciuj la precizajn datojn, plenajn nomojn de la menciinduloj, kaj en proksimume unu paragrafo skribu detalojn. Laŭeble, sendu ankaŭ fotojn. (2) Artikolo pri la esperanta movado, angle. Pritraktu specifan temon, menciuj precizajn faktojn, nepre evitu troigojn. Plej trafa estas artikolo, kiu pritraktas la spertojn de esperantisto pri interesa afero. Laŭeble sendu ankaŭ fotojn. (3) Artikolo rakontanta esperante spertojn pri instruado de esperanto, diskonigado pri esperanto, kc. (4) Artikolo speciale celanta lernantojn de esperanto. (5) Komentoj pri la movado esperanta. (6) Literaturajoj estas bonvenaj, sed, ĉar la **Revuo** ne estas beletra gazeto, ne povas ofte aperi. Verkante artikolon aŭ literaturajojn evitu klopodi "konverti la konvertitojn." Esperantalingva artikolo rakontanta la gloron de esperanto valoras nenion.

**Kiel verki:** (1) Verku koncize. Esceptante literaturajojn, klopodu limigi la artikolon al unu tajpita paĝo. (2) Verku en esperanto (esceptante anglalingvan informan artikolon, supre menciitan). (3) Verku klare.

**Kiel prepari sendotan tekston:** (1) Se la artikolo estas informartikolo, kiu perdos sian valoron se ĝi ne aperos baldaŭ, tajpu ĝin sur unu flankon de licenda aerogramo, kaj sendu ĝin rekte al la redaktoro. La aerogramojn vendas via poŝtofiĉejo. (2) Se la artikolo estas anglalingva informo pri esperanto, literaturajo,

aŭ io alia sen urĝa karaktero, tajpu ĝin sur ordinaran tajpo-paperon kaj sendu ĝin ordinarpoŝte aŭ rekte al la redaktoro, aŭ al la ĝenerala adreso de la **Revuo**. (3) Vi ne bezonas lasi ekstran spacon inter linioj. Ĉiu artikolo, preskaŭ senescepte, estas retajpenda antaŭ ol iri al la presisto, post sia redaktiĝo. (4) Se vi sendas fotojn, ili akompanu la artikolon. Rimarku ke oni ne povas inkludi fotojn en la aerogramojn. Foto estu klara, kaj sen multaj detaloj.

**Kien sendi la artikolon:** (1) Ĉiu artikolo povas esti sendata rekte al la redaktoro, ĉe la adreso: Donald Broadribb, 51 Primrose St., Moonsee Ponds, Victoria, Aŭstralio. (2) Neurgajn artikolojn vi povas ankaŭ sendi al la North American Esperanto Review, 808 Stewart St., Meadville, Pennsylvania.

**Kio okazos al la artikolo:** (1) Presotan artikolon la redaktoro gramatike korektos. Laŭ la bezonoj, li ankaŭ ĝin eble mallongigos. Kelkfoje ĝenerale bona artikolo bezonas stilan aŭ tekstan korekton. (2) Ofte bona artikolo ne povas tuj aperi, sed devas atendi. Foje artikolo, kiu neniel estas urĝa, atendas plurajn monatojn. La **Revuo** bezonas tiajn artikolojn, kiujn ĝi povus atendigi ĉe du aŭ tri jarojn, por havi arkivon da taŭgaj artikoloj pri multaj temoj, kaj tiel plivariigi la enhavon de la gazeto. (3) Urgajn artikolojn la redaktoro klopodas aperi ĝi sufiĉe frue.

**Kion speciale memori:** (1) La redakcio ne povas resendi fotojn, artikolojn, aŭ aliajn sendaĵojn. (2) Kutime la redaktoro agnoskas la ricevon nur de gravaj artikoloj. (3) La **Revuo** ne deziras artikolojn, kiujn jam presigis aŭ presigos aliaj gazetoj. (4) Se vi deziras ekstrajn ekzemplerojn de la numero, en kiu via artikolo aperos, vi devos aranĝi tion kun la direktoro de la administracio de la **Revuo**, Francis Helmuth, P.O. Box 6215, San Diego 6, California.

## MALLONGAJ NOTOJ

Fonograf-Disko por perfektigi la prononcadon de Esperanto estas eldonita de Editions Francaises d'Esperanto. La usona prezo estas \$1.50. La sekretario de ELNA, Conrad Fisher, raportas, ke ĝi estas tre klara, kaj la voĉoj parolas kiel en ordinare flua parolado.

Bela faldfolio pri la 18a internacia junulara kongreso de TEJO en Ystad, Svedlando, estas dissendota de la sekretario de ELNA al personoj dezirantaj ĝin. Se vi deziras ekzempleron, petu ĝin, aldonante tricendan poŝtmarkon por pagi la afrankon. Ni ankaŭ menciu novan Esperanto-faldfoliojn pri Wuppertal, senpage haveblan. Petu de Presse- und Werbeamt Wuppertal, Germanujo. Ankaŭ de la Werbe- und Verkehrsamt, Ehrenhof 3, Dusseldorf, Germanujo, haveblas esperantlingvaj folioj.—Ankaŭ havindaj estas: prospekto pri Hoor kaj Frostavallen—sendu respondkuponon por mendi ĝin, de Hoorbygdens Turisttrafikforening, Fako 101, Hoor, Svedujo; prospekto pri Steiermark, de Landesfremdenverkehrsamt für Steiermark, Landhaus, Herrng 16, Graz, Aŭstrujo; pri Salzburg, la urbo de la muziko, de la Turisma Oficejo, Makartplatz 9, Salzburg, Aŭstrujo; pri Nurnberg, de Esperanto-Informejo, Mogeldorfer Hauptstrasse 2, Nurnberg, Germanujo; pri Pensione Ristorante Esperanto, Cervia, Ravenna, Viale dei Mille 70, Cervia, Italujo (membroj de UEA ricevas 5%an rabaton); kaj politika broŝuro, Sciindaĵoj Pri la Sovjeta Zono de Germanujo, de la Federacia Ministerio por Tutgermanaj Demandoj, Bonn, Germanujo.

Al la internacie trovataj amikoj de Peggy Doneis Schneider kaj ŝia edzo Per, kies geedziĝon ni raportis pasintnumere, ni komunikas ilian novan adreson: 2105 Brackenridge St., Austin 8, Texas, Usono. Ili ĝoje daŭrigos sian korespondadon kun siaj amikoj tra la mondo, ĉe tiu nova adreso.

Time Magazine, fine de septembro, inkludis sur sia 78a paĝo mallongan noton pri la Esperanto-Klubo ĉe la

Universitato Harvard kaj ties varbada laboro.

Analog Science Fact and Science Fiction, la plej vaste legata kaj, aktuale, la plej altkultura sciencfikcia, gazeto en Usona, en sia numero por Aŭgusto inkludis la lastan parton de felietona rakonto "Border, Breed Nor Birth" de Mack Reynolds. La rakonto, tre lerte verkita, pritraktas la klopodadon de eksusonano starigi unuigitan Afrikon. Kiel oficialan lingvon li elektas Esperanton, kaj la aŭgusta felietonaĵo, i.a., eksplikas tiun elekton, bone priskribas la karakteron kaj utilecon de Esperanto, kaj specimene montras frazojn en la lingvo.

Humphrey Tonkin, prezidanto de la Junularo Esperantista Brita, estas studento aktuale en la Universitato Harvard. Li studas por doktoriĝi pri la angla literaturo.

16mm - Filmoj kaj akompanantaj magnetofonaj paroloj haveblas. Mendu la magnetofonaĵojn de J. Verstraeten, St. Bernardsesteenweg 1078, Hoboken, Belgujo. La filmoj estas: 1. Vintra Libertempo en Germanujo (menu de Sofedi, Renbaanlaan, 147 Avenue de l'Hippodrome, Brussels). 25 minuta, senpaga (vi devas pagi la sendkoston). 2. Belaj Koloroj—Bona-Humoro (same adreso, samaj kondiĉoj). 30 minuta. 3. Karlo Lineo (menu de via sveda ambasadorejo). 18 minuta.

La nova aŝiso pretigita de U.E.A. por varbi pri Esperanto estas nun akirebla. Ĝi prezentas modernisman bildon pri homa kapo kaj la vortojn "internacia lingvo Esperanto", kun granda blanka spaco, kie povas presigi nacilingva teksto. La aŝiso haveblas kun du ampleksoj: 4½ x 59 cm aŭ 58.8 x 83.2 cm. La kosto por la malgranda estas .8 stelo por unu ekz., 72 steloj por 100, 660 steloj por 1,000; por la granda, la prezoj estas precize duoblaĵ.

Joŝiko Kajino plurestas en Usono, kaj ŝia raporto pri sia agado en majo kaj junio aperis (mallongigite) en la numero de la 1 oktobro en **Heroldo de Esperanto**. Dum tiu periodo ŝi prelegis, i.a., en Cambridge, Boston,



Springfield, Greenfield, New York, Arden, Washington, D.C., kaj Lanham. La 3an de majo ŝi prelegis ĉe la Universitato Harvard, poste ankaŭ ĉe la Universitato de Boston. La radio-stacio WGBH disponigis 30 minutojn por radia programo, dum kiuj ŝi, James Liberman, kaj du aliaj esperantistoj paroladis. En Springfield, krom radio-intervjuo, kaj aliaj prelegoj, unu prelego doniĝis antaŭ 500 aŭskultantoj. En New York, prelego en la Biblioteko Hammar-skjold ĉe la U.N., filmprezento ĉe la Universitato Colombia, du radio-intervjuoj (arangitaj de Mark Starr), kaj duhora intervjuo kun Pearl S. Buck, estis nur malgranda parto de agadoplena halto. En Washington, D.C., la ĵurnalo Washington Post favore raportis, kaj la Voĉo de Ameriko (laŭ iniciato de William Solzbacher) disponigis 15 minutojn por brodkasto. En Meadville, ok artikoloj kaj unu radio-intervjuo akcentis la popularecon de nia japana vojaĝanto. Al ĉiuj ŝi dankas, pro helpo en la prelegvojaĝado, kaj al ŝi ni dankas pro alporto de freŝa, nova spirito al nia usona movado.

## DITTLUF ZETTERLUND

La 14an de julio, ĉijare, mortis pro koratako nia konata membro Dittlof Zetterlund. Naskite la 10an de marto, 1890, en Ishpeming, Michigan, de svedaj gepatroj, li loĝis dum la plej granda parto de sia vivo en Sacramento, California. Tie, en 1949, li lernis Esperanton en klaso instruita de la fervora esperantisto Helene Wolff el San Francisco.

En 1952, kiam oni planis nacian Esperanto-kongreson en San Francisco, multaj leteroj venintaj al la L.K.K. plendis pri la tiama kondiĉo de la usona movado. Dittlof Zetterlund proponis sian domon kiel renkontejon por diskutado, kiu rezultis je la formiĝo de nia ELNA la 27an de junio. Post tio, li fidele laboradis en la nova asocio, kaj ankaŭ plu studis la lingvon, ĝis koratako post tri jaroj necesigis malpli vigan vivon. Lia vidvino, Elvira Zetterlund, nun loĝas en Lincoln, California.

## LA LABORPLANO DE U.E.A.

En la antaŭa **Revuo**, inter la Rezo-lucioj de la Kongreso en Chicago, oni trovas la rekomendon ke membroj kaj grupoj en ELNA studu kaj apliku punktojn 12, 15, kaj 25 de la "Dua Baza Laborplano" de la Universala Esperanto-Asocio. Pro manko de spaco ni ne povis represi tiujn punktojn en tiu numero, sed ĉi sube ni ilin prezentas por la konsiderado de niaj aktivuloj:

12. **Landaj Asocioj:** Konforme al tiu-ĉi Baza Laborplano, prenante en konsideron la landajn cirkonstancojn kaj eblecojn, ĉiu Landa Asocio ellaboru propran programon kun aparta konsidero de jenaj taskoj: (a) organizi plifortigi la Landan Asociacion, altirante al ĝi la multnombrajn malnovajn esperantistojn kaj membri-gante novajn (tiucele informi ilin interalie ankaŭ pri la Baza Laborplano de U.E.A. kaj de la koncerna L.A.); (b) aliĝi senprokraste al U.E.A., se la koncerna L.A. ankoraŭ ne estas aliĝinta asocio; (c) en kunlaboro kun la Cefdeligitoj, se tia ekzistas, varbi kiel eble plej multajn individuajn membrojn de U.E.A.; (d) instigi la individuajn membrojn de U.E.A. fariĝi Deligitoj, Vicdeligitoj kaj Fakedigitoj, precipe por la plej gravaj fakoj rilatantaj al scienco, edukado, kaj kulturo; (e) organizi aŭ helpi organizon de L.A. en najbaraj landoj, en kiuj ankoraŭ ne ekzistas L.A.; (g) helpi la ekzistantajn lokajn grupojn kaj fondi novajn; (h) formi Informan Fakon, se tia ankoraŭ ne ekzistas, laŭ la Principaro de Frostavallen kun aparta atento al disvastigo de la Internacia Lingvo en la universitatoj, lernejoj kaj ĝenerale inter la junularo; (i) organizi tutlandajn korespondajn kursojn, radio-kursojn kaj kursojn en nacilingvaj gazetoj; (j) uzi ĉiam la Internacian Lingvon ne nur en kongresoj, konferencoj, kunsidoj kaj kunvenoj, sed ankaŭ ekster la oficialaj aranĝoj inter esperantistoj; (k) enhance plibonigi la landan organon kaj publikigi ĝin nur en la Internacia Lingvo (por agado inter neesperantistoj oni eventuale eldonu specialan nacilingvan bulleton); (l) helpi ĉiurilate la centrajn organ-

ojn de U.E.A. en la realigo de la Baza Laborplano.

15. **UNESKO kaj U.N.:** Utiligi ĝis maksimumo la eblecojn de la ĵus akirita nova pozicio (de U.E.A.) (kategorio B) en la konsultaj rilatoj kun UNESKO por efike kunlabori kun tiu Organizaĵo kaj U.N. en ĉiuj aferoj, kiuj interesas la Esperanto-Movadon kaj en kiuj ĝi povas doni realan helpon al la plenumo de diversaj agadoj de UNESKO kaj U.N., tute speciale en la Granda Projekto "Oriento-Okcidento"; en la projekto koncernanta la antaŭenigon inter la junularo de la idealoj de paco, reciproka respektado kaj interkomprenigo de la popoloj; en la agado en Afriko; disvastigo de la celoj kaj idealoj de UNESKO kaj U.N.; eldonado de klerigaj materialoj de UNESKO en la Internacia Lingvo; aktiva partoprenado en la konferencoj de UNESKO kaj en diversaj kunvenoj, seminarioj kaj aliaj aranĝoj organizitaj de UNESKO kaj U.N.

25. **Landaj Asocioj:** Antaŭvidi en la programo de ĉiu L.A. precipe jenajn taskojn: (a) reprezentiĝi en la Nacia UNESKO-Komisio aŭ almenaŭ kunlabori kun ĝi; (b) kunlabori kun la landa asocio por U.N., se tia ekzistas; (c) partopreni en ĉiuj manifestacioj okaze de la Tago de U.N., Tago de la Homaj Rajtoj kaj similaj datrevenoj; (d) kunlabori kun la landaj sekcioj aŭ landaj organizaĵoj, kun kiuj U.E.A. kunlaboras sur internacia nivelo; (e) realigi kiel eble plej efikan kunlaboradon kun landaj edukaj, sciencaj kaj ĝenerale kulturaj organizaĵoj kaj institucioj; (f) helpi al la mondaj kampanoj de U.E.A. laŭ specialaj planoj por la unuopaj kampanoj.

## DECIDOJ DE LA ESTRARO

(63-VI) Ke ELNA akceptu kun danko la inviton de la Esperanto-Klubo de Pittsburgo okazigi sian XI-an kongreson en 1963 en Pittsburg Pa.

## THOUGHTS FROM THE PENINSULA

While ELNA requires only 75% of a club's membership for individual club members to receive the special \$4 ELNA rate, our Peninsula Esperanto Club constitution requires 100% membership. These are some of the reasons why:—

We are convinced that if we want Esperanto in the schools, if we want it adopted as a second language for all, if we want to enjoy radio, TV, theater, and movies in Esperanto, we have to convince officials in schools and politics that Esperanto has merit.

**We can only do this from a position of strength.** We are asked two questions immediately when we speak about Esperanto: 1. How many Esperantists are there in the world? 2. How many Esperantists are there in the U.S.?

The answer is embarrassing.

Our national magazine has improved and is quite good; however, it is not impressive. Our editor says that if we would double our membership, we could have the magazine every month. If we would triple our membership, we could have a magazine twice the size.

It helps, of course, if individual members can subscribe in higher than the regular category, say as patrons.

But most important is that there be many more thousands of Esperantists in our country, so that our weight will be felt. At present our weight is so small that it does not even impress Esperantists.

Perhaps that is why they are not taking the task seriously? Results are the responsibility of each of us.

(63-VII) Ke la Estraro de ELNA nomu S-ron John Futran en New York kiel agantan kasiston de ELNA por anstataui S-ron Berry

Leosh Horsky:

## EKSTERLANDANA VIDPUNKTO PRI LA KONGRESO

En la esperanta vivo kongresoj ĉiam estas okazo uzi la lingvon kaj vidi ĝin disvastiĝi. Oni trovas siajn amikojn, korespondantojn, kaj ĝue trovas novajn vizaĝojn. Ĉijare la jubilea kongreso okazis en Chicago, kiu mem estas interesa. Antaŭ 155 jaroj ĝi tute ne ekzistis kiel urbo. Ni devas admiri la amerikan popolon, kiu konstruis tian belegan urbon. Kaj same la junan Esperanto-Societon en Chicago, kiu okazigis tie unufoje ELNA-kongreson. Ni scias, ke la plej granda parto de la laboro ĉiam kuŝas sur la ŝultroj de nur kelkaj entuziasmaj personoj. La Societo de Chicago feliĉe trovis ilin. Sen tradicio, sed energie ili preparis programon admirinde bonan. Ne eblas mencii ĉiujn, sed kelkajn mi volas elstarigi.

La rondvojaĝon organizis Dorothy Turner. Si aldancis ĉiam al la loko, kun la lerteco de baletistino, ĝuste kiam ŝi estis bezonata. Treege vigla. —Nervum rerum oni nomas latine la financon bazon de ĉiu entrepreno. Dum la tuta kongreso, mi ne vidis Forrest Turner alia, ol skribanta. Bona financa ministro, li lasis puran tablon. — Robert Runser, ideala koro de la kongreso, ofte beŭe parolis. En liaj manoj grandparte estis la organizado. — La bulteno kun poemoj, zorge preparita de Julie Regal, certe restos bone en la memoro de la kongresanoj.

Oni iris bonan vojon en Chicago, al esperplena estonteco kaj kun bona perspektivo.

A. Holzhaus

## ENIGMO

Serĉu la ĝustajn unuvortajn solvojn por la sekvantaj difinoj:

1. Scienco pri moneroj
2. subakvigi
3. dika araneo
4. satano
5. superregado de riĉuloj
6. saltinsekto
7. uzo de superfluaĵ vortoj
8. pruvi identecon
9. markrustulo
10. edziĝa manĝo
11. magia ŝirmilo
12. blovinstrumento
13. masonista ilo
14. sankta libro
15. plurbranĉa pendlumigilo
16. militista ornamajo
17. longe bakita kuko
18. alta ŝtona monumento
19. pralogaĵo de lando
20. astronomia punkto
21. veturilo sur akvo
22. stratlumigilo
23. hazarda evento
24. muzikilo
25. blanka akvo
26. mineralo
27. konifero
28. malgranda kvanto da komerc-  
ajo
29. distingiga vesto
30. ekzekutejo
31. ĝardeno purigilo

Legante de supre malsupren la trian literon de ĉiu el la 31 trovendaj vortoj, oni trovas esperantan proverbon. La solvon bonvolu sendi al la Redakcio. La solvo kaj la nomoj de solvintoj aperos en posta numero. Unu el la solvintoj ricevos libropremion (loto decidos, kiu estos la persono).


**LA ESPERANTO-KLUBO DE PITTSBURGO OFICIALE INVITAS  
ELNA-N OKAZIGI SIAN XIAN KONGRESON EN PITTSBURG  
PENNSYLVANIA EN 1963**

(detaloj sekvos)

Ella Gibson

## FORJHETU LA GUMON

(monologo)



### KLUBA VIVO

**Portland, Oregon:** Dum la foiro de Clackamas County, somere, okazis ekspozicio esperanta. Ĝia temo, "Telstar—What Language?" estis tre aktuala. La bildo montras la centron de la ekspozicio. Dum la montrado oni kolektis nomojn de interesatoj, kaj ankaŭ oni ricevis \$25 per interbuda konkurso.

**Walla Walla:** La 9an de aŭgusto, la kvar-membroj de Esperanto-klaso decidis fondi klubon nomotan la Montvida Esperanto Society. La klaso fondiĝis dum la printempo, post priesperanta prelego en la unitariaĉna societo, kaj progresis studante ĉiusemajne la libron **Step by Step in Esperanto**.

**Peninsula Esperanto-Klubo (Kalifornio):** Cathérine Schulze instruas salajrate du kursojn en la Sequoia Adult High School, en Redwood City . . . Ankaŭ somere en la foiro estis budo priesperanta. Efika novaĵo: kvar telefonoj staris ĉe la budo, kaj aŭdebla per la telefonoj estis kvarminuta ripetiganta informo angla kaj esperanta . . . La aŭgusta piknika kunveno de nordkaliforniaj esperantistoj en Napa altiris proksimume 75 personojn.

"Bonan tagon, klason. Kiel vi sanas? Bone? Mi fartas bone, ankaŭ. Estas bela tago, ĉu ne? La suno brilas. La ĉielo estas blua, sed la aero estas iomete frosta. La frosta aero donas al mi ruĝan nazon. Kion vi diras? Mia nazo ne estas ruĝa? Kian koloron ĝi havas? Ho, nun estas blua. Tio estas tre interesa. Mi estas blunazulo, ĉu ne?"

Ciuj sidiĝu, ni faru la vokadon. Arĉjo Adams? Estas nur silento. Arĉjo ne respondas sed li ĉeestas. Mi povas vidi Arĉjon. Li sidas en la unua seĝo en la meza vico. Rigardu Arĉjon. Kial li ne respondas? Kial ne? Bonvolu paroli pli klare, kaj pli malrapide. Kial li ne respondas? Jes, ĉar li dormas.

Ho, la malbona studento. Li ne rajtas dormi en la lernejo. Ni devas veki lin.

Ho, kian kriegon mi aŭdas! Arĉjo, kial vi faras tiom da bruoj? Car Jacjo pinĉis vin? Se vi ne dormus vi ne estus pinĉita. Diru al mi, kial vi dormis en la klaso? Car vi estas dormema? Kial vi estas dormema? Cu vi ne enlitiĝis hieraŭnokte? Ne? Kial ne?

Car vi rigardis la televidon ĝis la noktmezo? Vi estas malsaĝa knabo. Cu vi neniam aŭdis—

De frua enlitiĝo

Kaj frua leviĝo

Venas sana, kaj riĉa, kaj saĝa pliĝo.

Iu diris tion al mi, sed mi ne scias kiu. Skribu ĝin centfoje.

Miko,—vi aspektas kiel bovo kiu maĉas kaj maĉas. Iru al la nigra tabulo kaj, per la blanka kreto, skribu la esperantan alfabeton sur la tabulon.

Jes, ĝi estas ĝusta. Nun, kie estas la kreto? Vi manĝis ĝin! Vi devas esti malsata. Ne gravas. Jen alia peco de kreto. Kion vi diris? Vi

bezonas trinki akvon? Eble la kreto kaŭzas la soifon. Iru kaj trinku—poste bonvole sidigu en via sidejon.

Nun, mi demandas de la klaso kelke da enigmoj. Ĉu vi ŝatas enigmojn? Diru al mi kion la granda fiŝo diris al la malgranda fiŝo.

Milnjo—nun vi maĉas kiel bovino. Forjetu la gumon! Kion diris la granda fiŝo al la malgranda fiŝo? Ĉu iu ĝin scias? Ne? Neniu ĝin scias, do, mi diros al vi. La granda fiŝo diris, "ne malfermu la buŝon kaj vi ne estos kaptita." Estas bone dirite, ĉu ne? Memoru ĝin.

Jen alia enigmo. Kio longiĝas kiam vi fortranĉas ambaŭ ĝiajn limojn? Kiu ĝin scias? Arĉjo, ĉu vi ĝin scias? Ho, Arĉjo denove dormas. Jacjo, pinĉu Arĉjon denove.

Nun, kio longiĝas kiam vi tranĉas de ĝi ambaŭ ĝiajn finojn? Ĉu mi aŭdis iun diri vermo? Ne. Ne estas vermo. Se vi tranĉus vermon je ambaŭ ĝiaj finoj, la vermo mortus. Poste, eble vi povas fiŝi per la pecoj de vermo kaj eble vi kaptos la fiŝon kiu ne havas fermitan buŝon. Ĉu ne?

Kio longiĝas kiam vi fortranĉas ambaŭ ĝiajn finojn? Mi diros al vi la respondon: Fosajo longiĝas kiam vi fortranĉas ambaŭ finojn.

Ĉu vi ŝatas alian enigmon? Bone, sed parolu mallalite. Mi ne estas surda. Mi bedaŭras. Kio havas grandan kapon sed neniom da cerbo? Ne. Certe ne. Ne estas via instruisto. Estas brasiko. Ĉu vi iam manĝis brasikon? Mi ne ŝatas brasikon. Mi iam manĝis ĝin, sed mi ne memoras kiam.

Jen alia enigmo. Kio estas la lasta objekto kiun vi demetis kiam vi enlitigis? Ne. Ne estas ĉemizo; ne estas pantalono; ne estas ŝuoj;—estas la plandoj.

Nun la knabo antaŭe de Milnjo maĉas kaj maĉas. Georgo, forjetu la maĉgumon!

Jen bona enigmo. Kio apartenas al vi sola, sed aliaj uzas ĝin pli ol vi. Ne. Ne estas biciklo. Ne estas

kombilo. Ne estas poŝtuko. Estas via NOMO. Via nomo apartenas al vi sola, sed aliaj pli ofte uzas ĝin.

Alia enigmo. Kio havas du krurojn, sed ne povas piediri? Vilĉjo, ĉu vi scias?

Jes, Vilĉjo pravas. Estas paro da ŝtrumpoj.

Konjo, pardonu al mi, sed kial vi havas bulon en la vango? Estas stranga afero. Ĉu vi havas dentdoloron? Ne. Vi havas gumon. Malbona vi! Vi bone scias ke gumo ne estas permesebla en la klaso. Tuj, forjetu la gumon en la paperkorbon. Elinjo, transdonu la paperkorbon al Konjo.

Nun mi parolas al vi pli serioze. Atskultu bone. Ĉiu studanto havas unu kapon: du orelojn, por aŭskulti; du okulojn, por vidi; unu nazon, por flari; unu buŝon, por paroli kaj gustumi; ĉiu studanto havas du manojn, por palpi; kaj du piedojn, por marŝi; sed ĉiu simio havas la samon. Ĉu vi volas esti homo aŭ simio: Se vi volas esti homo, bone lernu ĉion, kion vi povas lerni. La sola diferenco inter homo kaj simio estas la cerbo. UZU LA CERBON. Tiu-maniere, iom post iom, vi iĝos saĝa homo.

Elinjo—vi faras strangajn bruojn. Kio igas vin tiel agi? Ĉu vi malŝanĝas? Ne? Ho, ŝi englutis grandan pecon da gumo kaj nun ŝi sufokiĝas. Batu ŝiajn ŝultrojn! Eble ŝi elkraĉos la gumon.

Kioma horo estas? Ho, estas la tempo de paŭzo. La sonorilo sonoras. Ĉiu por si mem.


—Gis la revido.

---

## ALDONU AL LA ADRESARO

Aldonendas al la adresaro 1962 de ELNA:

Ges - roj Sigurd Glassen, 1953  
Browning Blvd, Los Angeles 62,  
California (julio).



## EKZEMPLEROJ HAVEBLAJ

La sekvantaj ekzempleroj de nia **Esperanto Review** estas en la stoko ĉe la nacia adreso de ELNA en Meadville, Pa. La numero inter parentejoj indikas kiom estas disponeblaj.

1959—Jan-Feb (1), Maj-Jun (2), Jul-Aŭg (1), Sept-Okt (1).

1960—Sept-Okt (1), Nov-Dec (6); kune, Maj-Dec (1)

1961—dek kolektoj de la tuta jaro, minus jan-feb sed plus nov-dec de 1960; Mar-Apr (20), Maj-Jun (35), Jul-Aŭg (77), Sept-Okt (166), Nov-Dec (73).

1962—Jan-Feb (166), Mar-Apr (10), Maj-Jun (122), Jul-Aŭg (102).

La sekvantaj numeroj de **Heroldo de Esperanto** mankas en mia propra kolekto. Ĉu vi povas sendi ilin al ni? Indiku kion vi volas interŝange. 1955—no. 4; 1957—no. 15; 1960—no. 16 kaj 18.

## GAZETOJ RICEVITAJ

Kiel atentigite antaŭ pluraj monatoj, la membroj de ELNA memoru ke la plej multaj esperantaj gazetoj estas pruntepreneblaj de la nacia oficejo de ELNA en Meadville. Ni listas sube la lastatempe ricevitajn gazetojn—

Bulteno de la Geneva Esp-Centro (Svislando), no. 2; Dia Regno, no. 7-8; Esperanto en la Festivalo (Finlando), no. III/1; La Revuo Orienta, no. 7; Svisa Espero, no. 4; Heroldo de Esperanto, no. 1341; The Worker Esperantist, no. 145; Sonorilo (Belgujo), no. 4; Esperanta Finnlando, no. 8-9; New Zealand Esperantist, no. 242-243; Nia Voĉeto (Anglujo), no. 1; Paco, no. 100; The British Esperantist, no. 681; Suda Stelaro

## DE LA SEKRETARIO

(Brazilo), no. 2; Vjetnamio Antaŭenmarŝas, no. 2; Buletin (Hispanujo), no. 3; Espero Katolika, no. 527; Vivo kaj Sano; Dansk Esperanto-Blad, no. 6-7; Revue Francaise Esperantiste; Nia Ligilo (Israelo), no. 10; Norda Prismo; Australian Esperantist; Okcidentgermana Revuo; Nica Literatura Revuo; kaj kelkaj aliaj (nomoj poste aperos).

Gazetoj, kiuj ankoraŭ ne sendas siajn numerojn al la adreso de la **Review** en Meadville, sed kiuj volas interŝange ricevi nian gazeton, bonvolu sendi al ni sian gazeton kaj atentigi ĉu ili ricevas la **Review**.

## LETERO

Ni ekstraktas el letero de H. Dreyer al la Esperanta Libro-Servo (California), kun permeso, ĉi tiun paragrafon:

... Kion vi opinias pri "Libro de la Monato"-plano? Ekzemple, mi promesus aĉeti almenaŭ kvar (aŭ ses) librojn dumjare. Vi sendu la kvar (aŭ ses) librojn al mi **sen aparta mendo**. Laŭ mia antaŭa promeso, mi pagus tuj kiam mi ricevas ĉiun libron de vi. Tiamaniere, la s-anoj ne forgesus aĉeti bonajn librojn kaj ankaŭ helpus al la eldonado de aliaj libroj. Eble tia plano ne valoras en la praktiko, sed ĉu ĝi ne estas provinda?... Mi volonte estos la unua subskribanto al tia plano.

(La redakcio, kaj la libroservoj, volonte aŭdus opiniojn pri ĉi tio.)

\* \* \*

\* \* \*

## DEZIRAS KORESPONDI

**Hungarujo:**

Michael Farkas, Karoly u.14, Mezőkovesd. (32 jara lingvoinstruisto.)

**Indonezio:**

Islama Esperantista Klubo, ĉe Muhammad Luthfi, Djalan Noto-pradajn 48, Jogjakarta.

## ESPERANTO GROUPS IN THE UNITED STATES

Listed by State, City, and name of person to be contacted for further information.

### California:

Hillsborough: Peninsula Esperanto Club (Catherine Schulze, 410 Darrell Road).

Los Angeles: L.A. Esp. Club, 1406 N. Sycamore Ave., Hollywood.

Napa: Napa Esperanto Club (Martha Walker, 2846 Monticello Road).

Palo Alto: Esp. in P.A. (Bruce Kennedy, 2200 Oakwood Drive).

San Diego: Esp. Soc., P.O. Box 6215, San Diego 6.

San Gabriel Valley, Blind Study Group of (Mrs. Phillips Neuman, president, 2736 Cogswell Road, El Monte).

Santa Monica: Blanche Parker, 515 25th Street, Santa Monica.

### Illinois:

Chicago: The Esperanto Club of Chicago (Julie Regal, 310 4th Avenue, Downers Grove).

### Massachusetts:

Springfield: Greater Springfield Esperanto Club (Warren H. Gould, 114 Deerfield Street).

### Michigan:

Ann Arbor: Wm. C. Dickerman, 424 Hilldale, Ann Arbor.

### Montana:

Missoula: Esp. Study Group (Bob Davis, 1721 Helen, Missoula).

### New York:

The Esp. Society of Greater New York, 50 Overlook Terrace, New York 33, N.Y.

Esperanto-Klubo de Novjorkurbo, 340 Riverside Drive, New York 25, N.Y. (Julius Balbin, Penthouse 2).

### Oregon:

Canby: Mrs. Wallace Peterson, Route 2, Box 120.

Hillsboro: Adrian Hughes, 476 S. Bailey Avenue.

Portland: Portland Area Esperanto Club (ESPO) (Jim Deer, 12946 N.E. Hancock St., Portland 30).

Ohio: (See Pennsylvania).

### Pennsylvania:

Allentown-Bethlehem: Esp. Club of the Lehigh Valley (Donald Munro, 1961 Erie Ave., Quakertown).

Meadville: Esp. Study Group (Marcella Fisher, 808 Stewart Street).

Pittsburgh: Esp. Club of Pittsburgh (L. A. Spriggs, P.O. Box 8302, Pittsburgh 18).

Trištata Esperanto-Komitato (W.Pa., E. Ohio, N.W.Va), Frans J. Jahger, 2736 Locust Drive, Bridgeville, Pa.

### Washington:

Seattle: Vincent Griffeth, 8556 37th Avenue, S.W.

Spokane: H. K. VerPloeg, 1908 E. 8th Avenue.

Tacoma: Ruth Culbert, 1912 N. Monroe.

W. Virginia: (See "Pennsylvania").

### Wisconsin:

Janesville: Janesville Esp. and Humanist Society (Richard Sexton, 868 Blaine Avenue).

Se la supraj adresoj aŭ nomoj ne estas ĝustaj, aŭ se ekzistas aliaj grupoj, bonvolu sciigi:

DOROTHY HOLLAND, Estrino,  
ELNA Membreca kaj Organiza  
Komitato,

1701 Rockwood Trail,  
Fayetteville, Arkansas.

## LA MARVIRINETO

fabelo de Hans Christian Andersen, de ĉiu ŝatata, estas aperigita en luksa eldono de la dana esperantista eldonejo Koko. Koloraj bildoj, malofta lukso esperanta, elstarigas ĉi tiun Koko-libron. La prezo estas \$2.25, laŭ informo sendita de la eldonejo.

La plej ofte aperanta . . .  
La plej rapide informanta . . .

. . . Esperanto-gazeto

# HEROLDO

## DE ESPERANTO

De 40 jaroj je la servo de la Internacia Lingvo

- \* 20 numeroj jare.
- \* Ilustritaj raportoĵoj el la tuta mondo.
- \* Kultura paĝo pri literaturo, arto, muziko, sporto, kinoarto, ktp.
- \* Duobla Kongresa numero.
- \* Aktuala Filmkolono.
- \* Libera Tribuno de la legantoj.

jarabono: \$4

Abonebla ĉe

**S-ro D. E. Parrish, 328 West 46th St., LOS ANGELES 37**

*Mendu prounumeron ĉe la Redakcio:*

13 rue de la Reinette, Pijppelingstraat, Bruselo 1  
Redaktorino: Ada Fighiera-Sikorska

### APPLICATION BLANK

**Esperanto League for North America**

808 Stewart St., Meadville, Pa.

I am enclosing a check/money order for \$..... in payment of the following (check which):

..... year subscription to the **North American Esperanto Review**, \$3.00.

..... year membership in the **Esperanto League for North America**, including subscription to the **North American Esperanto Review** and associate membership in the U.E.A., \$5.00.

Name:.....

Address:.....

**ESPERANTO PRESS**

Oakville, Ontario, Canada.

Return and Forwarding

Postage Guaranteed.